

Johann Wolfgang von Goethe,
Trovaĵo

tradukita de Richard Schulz

Mi vagis sola
En la arbar'.
Nenion serĉi
Jen mia far'.

Enombre vidis
Floreton mi.
Lumanta stelo,
Okulvizi'.

Al mi plukonta
Jen ĝia vort':
„Ĉu ke mi velku
Al frua mort' ?“

Mi ĝin elfosis
Kun la radik'
Ĝin portis domen
Al la larik'.

Replantis tie
Ĝin en la fru'.
Ĝi nun kreskadas
Kaj floras plu.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.*

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Johann Wolfgang von Goethe,
Trovita

tradukita de Manfred Retzlaff

Mi tra arbaro
Sencele iris
Kaj trovi ion
Mi ne deziris.

Ĉe l' vojo vidis
Mi etan floron,
Kaj ege tuŝis
Ĝi mian koron.

Kaj kiam volis
Mi ĝin deŝiri,
„N rompu min!“, mi
Ĝin aŭdis diri.

Kaj mi singarde
Ĝin elterigis,
Al mia domo
Ĝin translokigis.

Alialoke
Ĝi nun kreskadas,
La eta planto
Kaj plu floradas.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-05-05.*

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)